

Al la verko „Abunde kaj redunde“ (havebla ĉe nia asocio) estas aldonita indekso da neologismoj, bedaŭrinde sen fontindiko.

Kiam mi eldonis antaŭ 18 jaroj indekson da tiamaj neologismoj, estis por mi surprize, ke kelkaj seriozaj samideanoj tiam avertis kontraŭ ĝia plua disvastigado. Kiam aperis PIV, ni ne volis akcepti evidentajn francismojn, kiuj abundas ankaŭ en ĉijare preparata suplemento. Nun ni vidas, ke kelkaj terminoj enradikiĝis ĝenerale en la esperanta gazetaro, eĉ en nia oficiala gazeto Esperanto. Abundo kaj redundo de la lastaj novismoj forprenis de multaj spiron. Jen kelkaj kritikaj vortoj:

„Esperanto estis kreita pro tio, ke eĉ tute simplaj homoj en la tuta mondo povu facile interkompreniĝi kaj la lingvo por ili ne estos malfacile ellernebla, kio ilin povus nur mallogi de ĝia lernado, ĉar ĝuste pro sia facila lerneblo kaj alta esprimovo kaj kapablo nur per sufiksoj tiom multe esprimi, ke estis necese nur ellerni la plej necesan bazon, de la lingvo. Ĝuste pro tio lernas la homoj facile Esperanton, kunvenas, komunikigas ... sed nur alliteraturistoj – por al si altnivelaj – povas provi uzi de tempo al tempo – la neologismojn, se necesas. Sed kiom da homoj en la mondo emas legi tiom malfacile deĉifeblajn artikolojn, poemojn eseojn ... nenio por reciproka kunfratiĝo tutmonda. La eksplika glosaro kreas tute memstaran parton de la tuta broŝuro, do ĝi devas esti konsiderata studmaterialo por la „altniveluloj“, sed nepre neinteresa kaj neakceptebla por simplaj kaj meznivelaj esperantistoj, kiuj sopiras pri novaĵoj, rakontoj, poemoj simplaj kaj facile kompreneblaj, sed tia „altnivela“ eseo de s-ano J. Rumler al tute komencantaj esperantistoj povas nur diri: „Ne lernu la lingvon. Ĝi estas tiom malfacile lernebla, ke vi perdos tempon.“ Malnova iama Esperanto estis ĝuste pro tio kreita, ke ĉiu – sen diferenco de raso, inteligenteco kaj ideaj konceptoj, estu bonvenigita, ĝuste pro sia facileco kaj ebleco baldaŭ interkompreniĝi kun la tuta mondo. Kelkaj aŭtoroj kapablas ĝis nun per iama Esperanto esprimi ĉion, kio estas esprimenda kaj nur malofte necesas uzi ankaŭ ili neologismojn – sed nur en kazo, ke alie ne eblas fiksi ĝustan esprimon. Krome ekzistas jam tiom da enradikiĝintaj neologismoj, ke nepre ne estas necese krei novajn, al neniuj konatajn esprimojn, kiuj jam foje sian neologismon havas. Kial do 3 neologismojn por unu esprimo? Ankaŭ mi konsideras la vojon de „Artliteratura sekcio“ kiel pekon kontraŭ Zamenhofa Esperanto, kvazaŭ ĝi estus kripligita kaj malfaciligita al tiuj, kiuj pri ĝi sopiras kaj fidas ĝin pro ĝia facileco. Eble mia kritiko pri la eseo de s-ano Rumler estas severa, neglektebla por tiuj, kiuj ĝin kreis, kiuj sekvas ĝian evolustilon, sed alie mi ne kapablas, ĉar dum 30 jaroj mi uzis nur Zamenhofan Esperanton kaj ĉiu min absolute komprenis. Speciale la neologismojn mi ĉiam envitis. Al mi iama origina Zamenhofa E-o sufiĉis por esprimi ĉion, kio estis necese, kaj ... mi diris dum 30 jaroj multegon“. JaCí.

„Pane Rumler, dozvěděla jsem se o Vašem pokusu zreformovat esperanto a tak Vám k tomu chci říci pár slov. Předem na vysvětlenou, proč píší česky: 1) nerozumím tomu Vašemu „obrozenému“ esperantu, 2) tomu mému klasickému asi zase nerozumíte Vy. Snad se domluvíme česky.“ la aŭtorino ne konsentas pri divido de E-o laŭ kategorio de ĝiaj uzantoj – komunikiga, scienca kaj poezia lingvo.“ ... Uznávám, že je nutné rozšiřovat základní normu slov v esperantu tak jako v kterémkoli jiném jazyku, ale především tam, kde je to účelné a v souladu s rozvojem vědy a techniky. Pochybuji, že esperantisté na celém světě začnou skákat radostí, že teď mohou používat např. vedle „kaj“ také „ak“ a „ed“. Totéž platí o dalších slovech.

Zkuste doporučit Ústavu pro jazyk český takové slůvko jako „erst“ nebo pár dalších slůvek našeho českého jednotvárného „a“! Měli by to a s radostí přijmout, že? Vždyť ani ta čeština není dokonalá a potřebovala by „vylepšit“. Vaše výrazy pro batolátka se možná budou zdát roztomilá mladé české mamince – esperantistce, ale určitě zbytečné a nenormální pro maminku německou, anglickou a mnoho dalších, které tuto potřebu nemají ani ve své rodné řeči. A jistě nebudete tvrdit, že jejich děti vyrůstají v duchovně zaostalém prostředí Nevím kolik a jakou esperantskou literaturu jste četl, ale snad Vám není úplně neznámo, kolik vynikajících děl bylo napsáno a co vše bylo vyjádřeno tím „dosud chudým umělým jazykem“ – a to dávno před Vaším zdokonalením! Kolik vlastně už bylo podobných „zlepšovatelů“ před Vámi! A každý věřil, že má pravdu a právo ... Ostatně jste se sám vystihl v názvu „Abunde kaj redunde“ – *redunda*: nadbytečný, *superflua*. Takže: hojně a zbytečně! Opravdu Vaše návrhy jsou přebytné, nepotřebné, chaotické! Jste si vůbec vědom toho, jaký zmatek chcete v esperantu natropit? ... Nakonec snad abych Vám ještě připomněla staré ověřené přísloví: dobrý mistr dokáže i z mála udělat vynikající věc. Ale snad také naopak ... Marta Šmidrkalová

... Zamenhof donis al ni proksimume 1250 vortoj kaj li scipovis per tiuj esprimi ĉion, skribi poemojn, eĉ traduki Bibliion La lingvo pliriĉigis ne nur per la novaj vortoj, kiujn la moderna vivo postulas, sed ankaŭ per la uzo de multaj ebloj, kiujn ĝia strukturo prezentas kaj kiujn eĉ Zamenhof neplene elĉerpis. Sed s-ano Rumler, en la artikolo „pri karesvortoj rilate al infanetoj“ proponas karesvortojn, kiujn neniuj Anglo, Hungaro, Fino, Svedo ktp. komprenos, ĉar ili estas puraj ĉeĥismoj – do al tio mi ne povas jesi, neparolante pri tio, ke ili tute neglektas la fundamentajn finaĵojn, kiuj devas esti netuŝeblaj, kvankam s. Rumler parolas pri „naive formulita netuŝebleco“ Se ni post DE uzus akuzativon, kiel li proponas, tiam ekestus ĉe ni, malnovaj esperantistoj, ĥaoso en gramatiko, ĉar ekzemple mi, jam pli ol 30 jarojn enkapigis, ke post la prepozicio DE neniam sekvos akuzativo Tre trafa „MALLONGA“ havas nur neologismon „KURTA“, (bona esprimo) kaj nun ĝi devas envicigi ankoraŭ „BREVA“. Do 3 esprimoj ekzistas por „krátký“. Ĉu ĝi estas lingvo por ĉiuj? ... Kaj se mi legas la artikolon, kie abundas vortoj, pri kiuj mi konstante devas foliumi en la glosaro, ĉu estas tia legado por mi plezuro? Mi mem konas multege da novismoj el germana, angla kaj franca lingvoj, sed ne ĉiu okupiĝis pri tiuj lingvoj, krom kiu jam komprenus „sajoranaŭo“ (japaneske?) ... Sed miaj haroj hirtiĝis, kiam mi legis en via (de s-anino Urbanová) artikolo „Ĥlumeco ĉe Cidlino“ Ĉu laŭ tiu via modelo ni devas ankaŭ uzi ekzemple: Hradeco Kralovo, Heřmanuvo Městeco ktp.? Mi devis tre ofte uzi glosaron, ĉar vortoj breve, kozo, enim, aŭtem, zemljanko, estas por mi novaj, nekonataj – mi diru eĉ nekompreneblaj esperantaj esprimoj ... Mi legis Litomiŝlan tombejon de s-ano Pič kaj trovis en la esejo de s-ano Rumler multajn t.n. piĉismojn. Mi ŝatas poezion, ĉar kiu ĝin ne ŝatas, tiu vivas nur duone, sed ĉu mi povas plezuriĝi per poeziaĵoj, kiun mi parte tute ne komprenas, pro multaj novismoj lavange en Esperanton enkondukataj? ... M.Josková-Vaněčková.

Mokete kritikan leteron sendis R.H. al E.U.: Estimata akademianino! Servus! Jenan mi skribas al vi por gratitudo pro la atraktiva opuso „Abunde kaj rebunde“. *From* la ricevo mi estas blazea. Mi arivis *al al* la opinio, ke Esperanto *esos* en ja jaro de la centenario kaj en postaj dekadaj imense iore potenca fakelo heliatra. Adaĝe mi legis la broŝuro kaj hophopis de paĝo al paĝo.

Aliibe mi ne trovis heliorajn kaj utiliorajn vortojn. Olim ni seniluziĝis pri nia lingvo. Pri tio mi tacias. Mi ne volis partcipi la movadon pro la vagna esprimkapablo. Til la apero de via vorko min trabis la polisemio de multaj esprimoj. Tunk simas omne okej!

Elvanuis sik la eblogo uzi stadndartan lingvaĵon de olduloj ak gerontoj. Deinde dikcio orsan esos juvenala en niaj enamikoj kaj ilies kritiko pri „artefarita lingvo“ kiksos. Kraval eksolentos!

Translati oni povas iore difcilajn esprimojn ril la rivon of la moderna homo. Graŭ la gnozo iore de tiu gemuta lingvaĵo kludos la guero po esperanto. Sajonaraŭ! Til nekste valeŭ!“

Sufiĉe da moko, sufiĉe da kritiko. Eble inter niaj legantoj troviĝos ankaŭ tiuj, kiu provas skribi poemojn kaj invitas kelkajn novajn esprimojn. Eble estas ankaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ pli akre malakceptos la novismojn. La pluaj paŝoj de la lingvoevoluo fontas el la diskuto. Kvanto da diversaj proponoj ne plu estas rememorataj kaj apartenas nur al la historio. Kelkaj tamen enradikiĝis. Evoluo de la lingvo estas afero de kelkaj dekjaroj. Al tiuj kiuj ne ĝisvivis la solvon oni povas nur rekomendi: profunde studi nian lingvon kaj uzi ĉiujn nuancojn de uzo de la klasika lingvo, kiun ni ĉiuj tiom ŝatas. Via redaktoro.

Esperantista klubo en Prago kun ĝojo atentigas siajn favorantojn, ke la estraro sukcesis gajni novajn klubejon pli proksime al la centro de la urbo en malgranda salono de agitada centro Prago 10, stratangulo de Kodaňská kaj Norská 3, kie estas flanko enirejo. De metroa stacio Placo de paco vi veturos per aŭtobuslinio nro 135, 101 unu haltejon aŭ per tramo nro 4, 22 3 haltejojn al la urbodomo, al Moskva-strato kaj poste maldekstre iom supren piede. Plue oni povas veturi el metroa stacio Ŝelivský per aŭtobuso 213, el Ďáblice per 126 kaj pluaj. Ĉiuj haltas en Kodaňská. La kunvenoj okazas ĉiam lunde de la 18,30 horo nur la 8an de junio pro teknikaj kaŭzoj vakos. La klubo (p.k.1069, 11000 Prago 1) sendos al vi volonte programojn.

La 5a kongreso de ĈEA okazos en la tagoj 11.-13.an de septembro en Olomouc. Elektiĝos nova estraro de nia asocio.

Esperantský klub v Praze s radostí upozorňuje své příznivce, že předsednictvu se podařilo získat novou klubovnu blíže centra města v malém sále agitačního střediska v Praze 10, Kodaňská ul. Rok Norské 3, kde je postranní vchod. Ze stanice metra Náměstí míru pojedete autobusovou linkou č.135, 101 jednu stanici nebo tramvají č.4,22 3 zastávky k radnici, k Moskevské ul. a potom kousek pěšky nahoru doleva. Dále je možno jet ze stanice metra Ŝelivského autobusem 213, z Ďáblic 126 a dalšími. Všechny stavy v Kodaňské. Schůze jsou vždy v pondělí 18,30 jen 8. června se nepořádá z technických důvodů. Klub (p.schr. 1069, 11000 Praha 1) pošle vám ochotně programy.

5. sjezd ĈES bude uspořádán ve dnech 11.-13. září 1987 v Olomouci. Bude volen nový výbor našeho svazu.

Novaj finlernintoj de la koresponda de Esperanto: (lektoro Hradil)

Noví absolventi písemného kursu esperanta: lektor Hradil

Ŝarŝe Petr, 1942, 10000 Praha Strašnice

Ing Jitka Hubková, 1958, 56501 Choceň

Lenk Milan, 1957, 69681 Bzenec

Šimonová Blanka, 1958, 985113 Branč

Ili estu bonvenigataj en nian Verda Familion!

Necht' jsou vítáni do naší Verda Familio!

X.kongreso de Slovakia Esperanto-asocio okazos 19an ĝis 21-an de junio 1987 en Nitra. Gastoj bonvenigataj. Partoprenkotizo kun loĝado kaj manĝado 250 Kčs. Aliĝu ĉe S-nino Mária Tomašovičová, Kpt. Uhra 9, 91501 Nové Mesto nV.

En la grupo de lektoro Ing Vlast. Kočvara finstudis bazan kor. kurson Jan Basarab, 73961 Třinec VII. č. 46. Li tuj aliĝis en la lokan klubon.

5-a kongreso de Ĉeĥa Esperanto Asocio okazos 11.an ĝis 13an de septembro 1987 en Olomouc. Krom oficialaj delegitoj povas partopreni en ĝi ankaŭ gastoj. Pri detaloj ni informos vin.

Bor u Tachova – estonta refreŝiĝa centro ĈES. Konstruado daŭrigas. Ĉefa problemo estas gajni specialiston elektromuntiston, kiu *alligus* elektran kurenton, por ke povu esti eluzitaj konstruaj meĥanikiloj. Ne veturu solaj al Bor. Por ĉiuj labospecoj aliĝu antaŭe ĉe la sekretario de ĈEA en Prago, Jílská strato.

Sudbohemia Esperantisto – estas titolo de la bulteno de Esperanto klubo Progreso České Budějovice. Ĝi aperas 10x jare kaj alportas freŝajn novaĵojn el la esperantista mondo. Mendu ĝin ĉe la redaktoro Emil Egner, Karla Štecha 8, 37005 Č. Budějovice.

Esperanto-klubo Vítkovice, poŝtkesto 55, 70300 Ostrava - okaze la 100jara jubileo de Eo sendas kontraŭ 10 Kčs paketon, kiu enhavas 25 leterpaperojn kaj 25 poŝtkartojn kun desegnaĵo de Pavel Rak (paca motivo).

X. kongres Slovenského esperantského svazu bude ve dnech 19. až 21. června 1987 v Nitře. Hosté jsou vítáni. Účastnický poplatek s ubytováním a stravováním 250 Kčs. Přihlašte se u

Ve skupině ing.Vlastimila Kočvary lektora, dokončil studium základního písemného kursu Esperanto Jan B. a přihlásil se do místního klubu.

Pátý sjezd Českého esp.svazu bude ve dnech 11.až 13.září 1987 v Olomouci. Kromě oficiálních delegátů mohou se ho zúčastnit i hosté. O podrobnostech Vás budeme informovat.

Bor u Tachova – Budoucí rekreační středisko ČES. Výstavba pokračuje. Hlavní problém je získání kvalifikovaného pracovníka, který by připnul elektrický proud, aby mohla být využita stavební mechanisace. Nejezděte sami do Boru. Na všechny druhy prací hlašte se předem na sekretariátu ČES v Praze, Jílské ul.

Sudbohemia Esperantisto – je titul časopisu esperantského klubu Progreso v Českých Budějovicích. Je vydáván 10x ročně a přináší čerstvé novinky z esperantského světa. Objednejte si ho u redaktora Emila Egnera, Karla Štecha 8, 37005 Č. Budějovice.

Esperantský klub Vítkovice, poŝt.schr. 55, 70300 Ostrava 3 – k stému jubileu Esperanta pošle Vám za 10 Kčs balíček, který obsahuje 25 dopisních papírů a 25 pohlednic s kresbou mírového motivu Pavla Raka.

Esperanto-rondeto en Vyškov SK ROH
Havlíčková 24, 98201 aranĝos okaze de la 100-jara jubileo de Eo ekspozicion de infanaj desegnaĵoj el la tuta rondo dum la Jaro de homoj sen rifuĝejo sub titolo „pacon por la vivo, pacon por niaj ludoj“. Partopreni povas infanoj ĝis 18 jaroj. Ĉiu partoprenanto ricevos respondon. Dorsflanke indiku nomon, adreson, aĝon kaj titolon de la desegnaĵo. Bonvolu sendi ĝis fino de aprilo.

Varbi por Esperanto en jubilea Jaro vi povas helpe de novaj verbaj afiŝoj, kiujn eldonis ĈEA. Ili anoncas prelegon pri Internacia lingvo, kiu devus enhavi historion de la lingvo, informan varban prelegon kaj enskribon por la koresponda kurso aŭ loka kluba kurso.

Rentkontiĝoj en Dudince: 3.-9.V., 30.VIII.-5.IX. (vegetaranoj, naturamikoj), 6.-12.IX. (fervojistoj). Loĝado en dometoj lignaj – 6 tranoktoj 150 Kčs. Termalakva baseno, vesperaj kulturaj programoj, kuirejo senpage je dispono. Aliĝilojn sendu al:
Ernesto Váňa, CS-96271 Dudince, Slovakio, ĈSSR

La 43a Internacia Junulara Kongreso invitas vin (17.-24.7.87 Krakovo). Supozata prezo kun event. senpaga restado en UK en Varsovio 2.200 ĝis 2.500 Kčs. Informoj Pavel Grůň, Kremličkova 6, 70900 Ostrava. Se vi volas kune veturi al la junulara kongreso bicikle (Dolní Kubín-Krakovo 159 km – 2 tranoktadoj – informoj Slezák Tamás, 2840 Oroszlány, Bánki D. u.41 Hungario).

Renkontiĝo de ĉeĥaj esperantistoj en Kladno okazos la 20an de junio 1987. Partoprenantoj aŭtobuse vizitos Lidice (5 km), solena meto de florkronoj. Informoj Jiří Slavík, 27303 Stochov 2.

Vizitu altajn Tatroj! Turisma tranoktejo en Esperanto domo de la slovakia asocio 25 Kčs tage por membroj. Kuirejo ne estas; proksime estas konvena restoracio. Skribu al Zväz esperantistov en Slovakio, Sobotské nám. 6, 05801 Poprad.

Esperantský kroužek 60201 Vyškov, SK ROH
Havlíčková 24 uspořádá u příležitosti stého výročí esperanta výstavu dětských kreseb z celého světa v Roce lidí bez přístřeší pod titulem „Mír životu, mír našim hrám“. Účastnit se mohou děti do 18 let. Každý účastník obdrží odpověď. Na obrácenou stranu udejte jméno, adresu, věk a titul kresby. Laskavě pošlete do konce dubna.

Propagovat esperanto můžete v jubilejním roce pomocí nových náborových plakátů, které vydal ČES. Obsahují ohlášení náborové přednášky, která by měla obsahovat historii jazyka, informativní náborovou přednášku a zápis pro korespondentní kurs nebo kurs místního klubu.

Setkání v Dudincích: 3.-9.V., 30.VIII.-5.IX. (vegetariáni, přátelé přírody), 6.-12.IX. (fervojistoj – železničáři). 6 noclehů v dřev.chatkách 150 Kčs. Termální bazén, večerní kulturní programy, kuchyně bezplatně k dispozici. Přihlášky:

43.Mezinárodní mládežnický kongres vás zve (17.-24. 2840 VII.1987 Krakov. Předpokládaná cena s event. bezplatným pobytem na UK ve Varšavě 2.200 až 2.500 Kčs. Informace Pavel Grůň, Kremličkova 6, 70900 Ostrava. Chcete-li cestovat na kongres na kole (Dolní Kubín-Krakov 159 km s dvěma noclehy – informace Slezák Tamás, Oroszlány, Bánki D. u.41 Maďarsko).

Setkání českých esperantistů v Kladně bude 20.června 1987. Účastníci navštíví autobusem Lidice (5 km), slavnostní kladení věnců. Informace Jiří Slavík, 27303 Stochov 62.

Navštivte Vysoké Tatry! Turistická noclehárna v esperantském domu slovenského svazu 25 Kčs denně pro členy. Kuchyně není; v sousedství je restaurace. Pište na Slovenský esperantský svaz, Sobotské nám. 5, 05801 Poprad.

Niaj forpasintoj Nia fidela legantino Hanka T a i t l o v á , 36005 Karlovy Vary jam ne povis legi nian lastan numeron de Verda Familio. La poŝto resendis nian lastan numeron de Verda Familio. La poŝto resendis ĝin kun noto: La adresato forpasis. Ŝi aktive partoprenis en la vivo de klubo en K.V. R a u v o l f Antonín, mezlerneja profesoro, Mladá Boleslav, Palackého 55 mortis la 24an de septembro 1987. Ek de sia junaĝo li aktive partoprenis en la kluba vivo de esperantistoj. Li mortis en la aĝo 81 jaroj.

Benjamin V ě k , forpasis la 19an de januaro 1987 en la aĝo de 92 jaroj. Li estis elstara esperantisto, dentisto, kiu multe aktivis sur kampo de kristana esperatista movado. Detalan nekrologon vi povas legi en Dia Regno kun lia fotografajo. Li estis ankaŭ aktiva instruisto, kiu propagandis Esperanton sur ĉiuj lokoj, kie li laboris, lastfoje en Benátky nJ.

Ne estos forgesata la memoro de gesamideanoj, kiuj multe helpis al disvastigo de nia kara internacia lingvo. Honoro al ilia memoro!

Malfruiĝon de tiu ĉi numero de Verda familio kaŭzis manko de pres-koloro por ciklostila aparato, post kiom ni sukcesis venki mankon de papero. Tial ni ne kuraĝas aldoni ankoraŭ monpagilon por la jaro 1987.

Turista esperanto-ekspedicio Ještĉd-Kozákov-Tuháň okazos la 9an de majo. Kunveno de partoprenantoj je la 9a horo ĉe monthotelo Ještĉd. Vespere bivakfajro en Tuháň, tranoktado en propraj dormosakoj. Informoj Bohuslav Koudelka, Tuháň 20, 51201 Slaná u Semil.

Turisticko-esperantská expedice Ještĉd-Kozákov-Tuháň okazos la 9an de majo. Sraz účastníků v 9 hodin před horským hotelem Ještĉd. Večer táborák v Tuháni, nocleh ve vlastním spacím pytli. Informace Bohuslav Koudelka, Tuháň 20, 51201 Slaná u S.

LENTAIGNE: KIEL DIRI? BLEKOJ-BRUOJ. Azeno iaas. Bovo muĝas. Ĉevalo henas. Hundo bojas, jelpas (kŭuĉi). Kapro mekas. Kato ŝpinas. Lupo hurlas. Porko gruntas. Ŝafo beas. Anaso kvakas. Koko kokerikas. Kokino glukas. Kolombo kveras (=rukulas). Najtingalo kantas. Pasero pepas. Rano kvakas. Cikado ĉirpas. Muŝo zumas. -

Akvo eliranta el botelo gluglas. Ŝlosilo en seruro grincas. Vipo klakas. Krevanta balono knalas. Pordo knaras. Tondra krako. Ondoj plaŭdas. Serpento siblas. Monero sonas. Kristala glaso sonoras. Glasoj tintas.

Rompobruo. Eksploдробruo. Bruo metala, raspa, infera. Malbrua tajpmaŝino. Fonbruo (fonbrua filtrilo). Multe da bruo por nenio. Pli da bruo ol da faro. Mi silentos ĝis oni ne bruos. La laŭtega muziko senbruis lian krion.

Korepondi deziras: (mallongiloj: bk = bildkartoj, ĉl = ĉiu lando, ĉt = ĉiu temo, dez = deziras, itŝ=interŝanĝas, j=jaroj, kol=kolektas, kor=korespondi, m=muziko, pm=poŝtmarkoj, tm=tuta mondo

Samarkanda Klubo de Interpopola Amikeco „Esperanto“ p.O. box 76, 70300 Samarkand, Uzbekistan USSR – organizas internacian ekspozicion pri la agado por la vivmaniero, kontraŭ alkoholo kaj fumado – kolektas tiutemajn propagandajn materialojn. Ĉiu helponto ricevos memorajon.

Laleli, Genotürk cad., Mahfil sok No: 20 kat 4, Istanbul-Trukio peras por esperantistoj diversajn servojn: malmultekostan tranokton en Istanbul à 5 US dol, kun manĝo kaj ekskursoj 15dol tage, restadloĝado ĉemara (Isik) laborbrigadojn por junularo Ea, korespondan interŝanĝon kun turka junularo, grupan interŝanĝon de restadoj de la junularo.

Stamat Valĉanov, 36j fervojista inspektoro kor tm, ul. „Br.Skorpil“ 11a, BG9000 VARNA bulg.

Marija Pejкова, PK 15, BG-5000 Veliko Tarnovo, Bulg dez kor pri ĉt (kun grupo da amikinoj diversaĝaj-komuna adreso)

Bernard Golden havas novan adreson: Damjanich u.1/C,I.8, H-8200 Veszprém.

Frato Shan-Hui 4 Viola Road, Apt.5C, Spring Valley, NY 10977, US volonte diskutos kun vi pri vijaj personaj malfacilaĵoj.

N.P. Sestopalov, ul. Pionerskaja 37-24, SU-682200 Birobigan, Sovetio, 22j studento, dez kor kun tm pri ĉt

Deng Yuan-Ping dez kor kun amikoj el tm pri diversaj temoj: Adreso (20j instruisto) Changshou Zhongxue, Zhongxiang Xian, Hubei, Ĉinio

Sinjoro Silvan Mugliette, 7, Trioq Santa Tereza, Ghaxaq, Malto, gvidanto de junulara klubo serĉas korespondantojn por la klubo.

V. Pospíšil, Na Vápence 771, 46822 Železný Brod pruntedonos numerojn de ĉina scienca gazeto „Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj“ kontraŭ poŝtelspezoj.

Marina Gerasimova, ul. Lenina, d.15, kv. 203, 610004 Kirov USSR kursgvidantino serĉas korespondantojn por sia grupo diversaĝa.

Dakara Esperanto klubo, s-ro Alphonse Diatta, Villa 218, H.L.Fass, Dakar, Senegalo – serĉas korespondamikojn por 15 ĝis 30 jaraj kursanoj.

Ludmila Solovjova, SU-610046 Kirov, Oktobra Avenuo, d.113 kv 120 dez kor pri vojaĝoj, m, kinoarto, kuirado.

Vognon Josette, c/s, Vignon Honoré, Direction générale OPT, Cotonou, popolresp. Benino, lingve bona, volas kor pri ĉt de tm.

Zonkpe Dovi.C.Ben, triageracia esperantisto, talenta, flegisto pri lepro, C.T.L., Guéné, Malanville, Rép.Pop.du Benin

Esperantajn materiajn por instruado serĉas Edmond Ludwig, 26, route de la Schlucht, Stosswihl, F-68140, Münster, Francio.

K.Koffi Tettegah, 12 Turton Street, Lafiaji-lagos, Niĝerio, kiu ellernis Esperanton dum du monatoj dez kor kun tm.

xmxxmxxmxxm

xmxxmxxmxx

xmxxmxxm

xmxxm

xmxx

xx

Esperantský klub
29501 Mnichovo Hradiště

Otevřená listovní zásilka
Presajo
Imprimé

EK MH 74/87